


星回字標

LEONTODO

N-ro 29



HOKKAIDO ESPERANTISTA LIGO

Aŭg. 1963

279 H.E.K. (花洋, '63.8.3~4)

ENHAVO

LA 27-a KONGRESO DE HEI EN ŜUKUCU, LA BELA MARBORDO	(1)
NI BONVENIGU ĜES-ROJN WISE.....	(6)
KUN S-RO LATOUR EL GUATEMALA	(11)
(T. Takahasi)	
VOJAĜO DE DORIS M. WORCESTER AL LA BELA INSULO DE HOKKAIDO	(17)

LA 27-A KONGRESO DE H.E.L.
EN SŪKUCU.LA BELA MARBORDO

Ni okazigis la 27-an kongreson de Hokkaido Esperantista Ligo en Sūkucu, la famekonata marborda parko de Otaru, jekla 3-a kaj la 4-a tago de Aŭgusto.

Je la 3-a tago, posttagmeze, ni kolektiĝis grupe kaj grupe, al nia kunsidejo nomata "Omi-Sokudo", kiu troviĝas apud la Otaru Akverio kaj "Haringo palaco", la kongresejo.

Post atingo al la kunsidejo, ni ekiris al la maro por tie ĝui naĝadon kaj boat-ludon. Estis sabate kaj troviĝas amasaj gejunulaj kiuj ĝojas naĝi tie kaj ĉi tie.

Kompreneble niaj 3 knaboj el Hobezu treege ĝojas naĝi en la maro kaj niaj 2 knabinoj, "ambau Lumi" ankaŭ. Ĉar Lumi Kodama kaj Lumi Takahaŝi havas ne nur saman nomon sed ankaŭ saman aĝon (ili estas ambau 8-jara) kaj ili renkontigis tie la unuan fojon. Post unumomente hontigo ili amikiĝis kiel 2 fratinoj. (S-roj Kodama kaj Takahaŝi estas jam malnovaj amikoj per Esperanto kaj ili donis nomon al siaj unuaj filinoj "Lumi" tute ne antaŭkonsilante.

Estas karakteriza afero ke kelkaj familianoj kaj tre junaj geknaboj partoprenas al nia kongreso.

Je la 5-a p.m., kiam ni revenis de la maro jam pli ol 20 samideanoj kolektiĝis kaj ni sidis ronde en la kunsidejo kiel unu familio. --- Babiladis multe kaj lernis kelkajn vortojn kaj baldaŭ ĉiuj amikiĝis unu alian.

Post vespermanĝo ni kunsidis ĉirkaŭ s-ro Hoŝida kiu gvidis nin al gaja horo. Titoloj estas "Knabino" kaj "Kanto de Studentoj" kiuj estos kantata kiel Horo Grandioza en la 50-a Japana Esperanto Kongreso.

Kelkaj ne kutimis kanti sed lerta gvidado de s-ro Hosida kaj helpo de junulinoj laŭtigis niajn horojn.

Babiladas antaŭ kuko kaj akvomelono.

Poste s-ro Jokojama, kiu estas bona alpinisto en Otaru, ĝojigas nin per lumbildoj kiujn li mem fotografis en lia grimado en la montoj de Hitaka.
(esperanta klarigo)

La domo de Omi-Sokudo estas kompreneble granda domo sed ne taŭgas por kvieto dormo, ĉar ni, 26 person-

oj devis dormi en 1 ĉambro kies vasteco estas 24
ĵoojn , kaj kelkaj 2 personoj dormis en 1 kuseno,
kaj kelkaj mankis ĉapkusenon .

Sed malvarmeta venteto el kvieta maro baldaŭ
dormigis ain en bonan dormon , en bonan rokon....

Matene , je la 4-a tago , nia festtago estis
bela feliĉe por ni .

Post matenmanĝo ni rapidis iri al la kongresejo .
42 gesamideanoj kolektiĝis en la "haringo-palaco "
(kiu estis luksa domo de riĉa fiŝkaptisto sed
nuntempe oni ne kaptas haringo kaj la posedanto
de la domo donis ĝin al la urbo---kaj nun ĝi
estas rekonstruita en Sukucu en la nomo de "haringo-
palaco")

Je la 10-a horo ni malfermis nian 27-an kongreson.

I. MALFERMA SALUTO

Lumi Takahaŝi , la 8-jara knabino salutis en
lerta esperanto.

II. HORO "IA ESPERO"

III. SALUTO DE PREZIDENTO DE HEL

D-ro Jamaga salutis kiel prezidento de HEL

IV. ELEKTO DE PREZIDENTO DE 27-a HEL-KONGRESO

S-ro Hoŝida estis elektata kaj salutis al ĉiuj
petante karagan diskuton .

V. RAPORTOJ

1. HEL---s-ro T. Takahaŝi
2. Sapporo---s-ro Kimura
3. Tomakomae---s-ro Hoŝida
4. Muroran ---f-ino Jamada
5. Juni--- s-ro Nitta
6. Otaru---s-ro Hajskaŭa
7. Hobocu--- s-ro Sioja

El la raporto de HEL sekretario ni sciigis ke

okaziĝis disciplinado en Tomakomae kaj nia
organo LEONTODO estas eldonata 4 foje en unu jaro

El la raporto de lokaj asocioj ni sciigis sekv-
antajn aferojn :

1. Tomakomae-anoj kaj Muroran-anoj havis ture

goigan tempon en iliaj 2 fojaj ekskursoj al Okotampe kaj al Moorapp.

2. Kelkaj tre gojwis bonvenigi fremdajn gesamideanojn ---s-inon Worcester kaj s-roa Latour el (Guatemala---

3. Kursoj por komencantoj estis ne tre viglaj malgraŭ liaj penadoj, sed ni ĉiuj penas por vastigi nian esperantujon. Junjanoj eble povos fortigi ilian lokan movadon. Estas granda progreso por nia movado ke Esperanta klubo aperas en Hobecu mezlernejo.

KAJ KONKLUDO

VI. DISKUTO

1. Pri la Movado de HOKKAIDO KOENKAI por la 50-a Universala Kongreso

Ni decidis subteni la movadon de "SEKAI ESPERANTO TAikai HOKKAIDO KOENKAI" kaj por tio subtenantoj sciigu al HEL-sekretario pri kiom vi deziras monoferi. Kaj ni alvoku kaj petu monoferon al kelkaj neesperantistaj asocioj kiuj speciale koncernas pri turismo. → ESP.

2. Pri Eldono de Gvidlibro de Hokkaido.

Ni decidis peni eldoni esperante klarigitan gvidlibron de Hokkaido antaŭ ol Olimpika jaro.

3. Pri Eldono de Leontodo

4-foja eldono en 1 jaro estas neese, sed ĝi estos eldonata en monsumo de ĉiujara subtena mono.

4. La 28-a HEL-a Kongreso

Okazigos en Muroran venontan someron.

5. Pri Disciplinado ^{havos}

Ni okazigos ĝin en Oteru de jarfino ĝis jar-komenco kiel en la lasta disciplinado.

6. Pri Aligo al Pac-amikiga Festo (Heius Jukoosai)

Junulara Organo petu partpreni al la festo por propagandi esperanton. ^{alparolu}

7. Aligo al Japana Esperanto Kongreso

Ni petas al s-ro Hoŝida kiu jam decidis partpreni al la kongreso ke li raportu pri la movado de HEL.

8. Pri Nia Membro Kotizo

Ni decidis ¥300 po 1 jaro

VII. TAGMANCO KAJ FOTOGRAFO

Ni denove iris al Oomi-Sokudo por tagmanĝi.
 Estis dimanĝe kaj troviĝas amasaj homoj . Pro tio ni
 ni devis stendi maneĝojn tre longan tempon .
 reveninte antaŭ la kongresejon ni fotografis .

VIII AMUZAJO

Ni siaprezentis unu la alian por amkiĝi.
 Sed tiam restas ne sufiĉa tempo . Do, ni denove
~~Per la xxxxxxxxxx~~
 kantis "KNABINO", "KANTO DE STUDENTOJ", kaj "TAGIGO"
 per la gvido de s-ro Hosida.

IX. FERMA SALUTO

Amiko Takahaŝi, la 6-jara knabino salutis per esper-
 -anto

x. al akvario AL AKVARIO

~~xx~~
 Ni forlasis la kongresejon je la 2.30 p.m.
 kaj iris al la urban akvarion , kie ni vidis diversajn
 fiŝojn kaj maran kreskaĵon .

XI ADIAŬO

Ni forlasis Sukuzu je la 3.30 p.m. por reiri al
 la stacidomo de Otaru . Estis belaj pejzaĝoj kiam
 ni vidis marbordon de Sukuzu, Takasima kaj Otaru
 haveno, sed ni bedaŭris havi nesufiĉan tempon por
 resti en la belaj stratoj de Otaru.

"Ĝis revido"

"Ĝis revido en Muroran !"

Tiuj elparoloj en la stacidomo signifas kaj montras
 karan memoron en Sukuzu kaj esperon al la venonto
 kongreso de HEL. en Muroran

per ŝipo

.....

PARTOPRENINTOJ EN LA 27-A KONGRESO

- El Otaru - ro Jamaga Isamu
- s-ro Eguci Otokici
- s-ro Hajakawa Noboru
- s-ro Takahasi Tacuji
- s-ino " Jasuko
- f-ino " Lumi
- f-ino " Amiko
- s-ro Jamamoto Ŝoojiro (ne ĉeestis)
- s-ro Jokojama Josikazu
- s-ro Satoo Fujiō
- f-ino Sasaki Hisako (4)

^ saĉiko

f-ino Sintani
 f-ino Koizumi Keikō
 s-~~ino~~ Iŝiguro
 f-ino Saito Jukiko
 f-ino Tobibajaŝi Junko
 f-ino Mijabajaŝi Tokuko
 El Muroran s-ro Hirata Iŝeo (ne ceestis)
 s-ro Hamada Kunisada
 f-ino Kobajaŝi Jooko
 s-ro Takahaŝi Hideizi
 f-ino Sakai Jukie (ne ceestis)
 s-ro Muraki Akinori
 f-ino Jamada Cuju
 El Sapporo s-ro Takahasi Jooizi
 s-ro Kodama Hiroo
 f-ino Kodama Lumi
 s-ro Aizawa Haruo
 s-ro Kimura Kimiji
 f-ino Jura Ecuko
 s-ro Gotoo Joŝiharu
 El Hobecu s-ro Sioja Noboru
 s-ro Sugano Keiĉiro
 s-ro Kuwabara Njoizi
 s-ro Jamaguĉi Jun
 El Juni s-ro Nitta Tameo
 s-ro Izumija Akinori
 El Tomakomae f-ino Kitagawa Mieko
 f-ino Hori Masako (necestis)
 s-ro Kageura Hideaki
 f-ino Kitabatake Hitomi
 f-ino " " Ĉizu
 s-ro Hosida Agusi
 s-ino " Fumiko
 f-ino Monius Taeko
 f-ino Oosawa Jooko
 El Sarabecu s-ro Tacumi Kijomi
 El Sapporo s-ro Satoo Minoru (ne ceestis)

KONTO PRI LA KONGRESO
 Enspezo pagitaj monoĵ en la 26750
 Kongreso
 Neceestistaj partoprenantoj 500
 " " 100
 Monoferode s-ro Jamaga 5000
 s-ro Eguci 500
 (5) s-ro Hirata 300

s-ro J. Takahasi	300
s-ro T. Takahasi	150
s-ro Hajakawa	100
s-ro Jokojama	100
s-ro Kageura	100

SUME 33,900

Elspezo	por noktigi	5,200
	por vespermangi	9,000
	por matenmangi	2,800
	por tagmangi	3,700
	por kongresejo	1,200
	por akvario	1,550
	por feribonto	830
	por Kuko ktp	
	(por nokto)	2,920
	(por kongreso)	3,600
	kongreslibro ktp	
		1,750
	fotografo	1,000
	monofero al HEL	270

SUME 33,900

Restas 0

NI BONVENIGU GES-ROJ WISE

En la lasta informilo mi informis al vi, ĉiuj, ke ges-roj Wise el Novzelando vizitos Hokkaido-n, kaj lastatempe ili sciigis al nia prezidento de HEL ke ili vojaĝos en la plano, kiun mi skribas ĉi sube;

je la 4-a de Okt., Atingo al Ĉitose Aerhaveno
Nokte en Sapporo.

je la 5-a de Okt. Vizito al Otaru
Nokte en Otaru

je la 6-a de Okt. Al Sapporo kie okazigos festo
de "Leona Klubo"
Nokte en Sapporo

(6) 0

je la 7-a de Okt., Vizito al Tomakomae.
 Nokte eble en Noboribecu
 je la 8a de Okt Vizito al Muroran
 Nokte eble en Toja-lago
 je la 9-a de Okt Al Hakodate

Mi petas al la lokaj gessmideanoj bovenigu ilin en via urbo. Se vi deziras havi kunsidon kun ili, ili volonte ĝeestos kaj plie ili montros lumbildon kiu ili ĝiam portos en ilia vojaĝo. Mi konios klarigon de ilia lumbildokiel ĝi sube;

PAROLADO PRI NOVZELANDO

Unue mi deziras elmontri ke estas multaj aferoj pri kiuj Japanujo kaj Novzelando tre similas. Rigardu ĝi tiun bildon, sur kiu vi vidos mapojn de la 2 insuloj landoj. Ili havas la saman skalon do vi povos taksu ke (se oni allasus Hokkaido inssulon) ili havas proksimume la saman enlimajon.

La streko trans Japanujo estas 40 gradoj norde kaj la streko trans Novzelando estas 40 gradoj latitudaj sude.

Do kompreneble oni pensas ke la 2 landoj havas similan klimaton. Sed tio ne estas tute korekta. Novzelando estas tre malproksimexxa al alia tero kaj la Pacifika Oceano donas al ĝi tre mildan klimaton. Japanujo estas apude la Azioa kontinento. Do ĝi havas pli varman someron kaj pli malvarman vintro.

Ambaŭ landoj estas longaj norden kaj suden, kaj maldikaj okcidenten kaj orienten. Ambau es kurbigas tre simile.

La indigenoj de Novzelando, nomitaj Maorioj estas brunhaŭtuloj tre simile al la japanoj. Tre kurioza la fakto ke la Maoria lingvo ofte sonas tre simile al la japana. Aŭdu kekajn Maorisjn vortojn; --Taranaki Komate Awamutu Kuiti Eketehuna OtiraKaikoura Otaki Orouiti kaj multaj aliaj.

Montegaro etendas laŭlonge la suda insulo Novzelande kaj ankaŭ laŭlonge du trionoj de la norda insulo.

Japanujo ankaŭ havas montaron laŭlonge. Vulkanojn ankaŭ ambaŭ havas kaj unu Novzelande vulkano similas multe al la mondfama Fujijama.

Fakte Japanaj kaj Novzelandaj vulkanoj ankaŭ estas parto de la "ĝeno de Fajro" kiu tute etendas ĝirkaŭ ke Pacifika Oceano. Ankaŭ troviĝas termaj regionoj en ambaŭ landoj.

Sed tute malsimile estas iliaj historioj.

Japanujo ĝuis tre maljunan kulturon kiu malantaŭiras ĝis antikvaj tempoj.

Jen estas historieto de Novzelando .

La blankhaŭtaj indigenoj de Novzelando estas plej bona tipo de Polinesianoj . Ili ne havis skribitan lingvon , do ni devas fidi al legendo kaj tria genealogio, rakontita je unu generacio al la sekventa, por nia sciado de ilia historio antaŭ la alveno de la blanka-haŭtaj eŭropanoj .

Kompreneble , tia historio estas iome neklara.

Sed oni kredas ke la Maorioj venis al Novzelando de iuj pacifikaj insuloj kiaj Samoa aŭ Taniti. Maoria legendo nomas la lokon "Hawaiiiki". Tamen la gento certe estas Polinesia.

La antikvaj Polinesiuloj vojaĝis kuraĝeme en senferdekaj kanotoj, du kaj tri milkilometraj trans ne-kartika oceano. Por navigado ili uzis inventeman ilon faritan de bastonoj kaj ŝnuroj . Ili direktis la bastonon al iuj steloj kaj tiamaniere, dum nokte , kolektis ilian vojiron . Dum la tago ili siadirektiis per la suno.

Sajne estis tri ĉefaj migrigadoj al Novzelando proksimume ĉirkaŭ la sepa , la naŭa kaj la dekdua jarcentoj . Do, dum proksime mil jaroj , la Maorioj estis la solaj enloĝantoj de ĉi tiuj sudaj pacifikaj insuloj , nun nomita "Novzelando".

La unua eŭropano kiu eltrovis Novzelandon estis la Nederlanda ŝipestro, Abel Tasman. En la jaro 1642 li velveturis de Batavia suden , laŭlonge de la orienta marbordo de Aŭstralio.

Malfavoraj ventoj lin portis oriente kaj tiel iom hazarde , li igis la unua blankhaŭta eltrovanto de la lando kiu li mem nomis Novzelando. Li velveturis norde laŭ la okcidenta marbordo sed li ne alterigis.

Tiam li revenis al Batavia.

Neniu eŭropano vidis Novzelandon dum la sekvantaj cent kaj dudek-sep jaroj , ĝis la jaro 1769, kiam la fame-konata angla ŝipestro James Cook unue vizitis ĉi tiun insulon . Li estis la unua eŭropano piedpremi la teron de Novzelando kaj li alterigis precize kie nun staras urbeo Gisborne kie mi loĝas.

En lia ŝiploĝo li rakontis kiel li marŝis laŭlonge la sablomontoj kie nuntempe staras mia hejmo.

Dum ĉi tiu kaj du sekvantaj vizitoj , ŝipestro Cook plene esploris la tutajn bordojn de la ĉefaj insuloj . Liaj priskriboj pri la lando kaj ĝia ebleco por koloniado gajnis atenton en Britujo. Post ne longe, baleno kaj fokokaptistoj aperis sur la apudaj maroj. Ĉi tiuj estis sekvantaj je komercistoj kiuj avidis la bonan indigenan formian fibron , kaj la faman kaurian lignaĵon .

Kompreneble ko-menciĝis koloniĝoj . En 1840 jaro oni aranĝis kun la Maorioj la "Trakto de Waitangi" per kiu la Brita regado certigis al la Maorioj iliajn rajtojn kaj libecon , la posedon de iliaj ~~xxx~~ tribaj teroj, arbaroj kaj fiŝkaptantaj lokoj, kune kun personan protekton kaj egarecon en la leĝo kun Britaj regatoj . Ĉi tiu trakto ebligis la la nordan mirindan evoluadon de Novzelando al nacio .

Ĝin iom da geografio de la lando . Malmultaj scias precize kie estas Novzelando . Troviĝas proksime du mil kilometroj oriente de Australio kaj dek mil kilometroj okcidente de Suda Ameriko .

Novzelando konsistas el du ĉefaj insuloj kiuj etendas por dek ses mil kilometroj norde kaj sude sed la mezlarĝo oriente kaj okcidente estas nur proksime du cent kilometroj . Ĉi tiu okazo iam donas al la lando multan klimatan diferencon sed dirante ĝenerale , la klimato estas milda kaj ne multe variema .

Elstarax fizika karakterizaĵo de Novzelando estas la montoj , La pli altaj montoj de la Norda Insulo okupas unu dekonon de la enklimo sed ekcepte kvar montsuproj , ili ne estas pli altaj ol ses mil futoj . Sed tute laŭlonge la Suda Insulo , etendiĝas granda montaro, kiu havas ne malpli ok-dek sep montsuproj, pli altaj ol dek mil futoj . Inter ili , multaj grandaj glaciejoj pleniĝas la x valojn . La plej granda glaciejo abrupte malsupreniĝas tra densa pluv-arbaro ĝis nur sepcent futoj supre de marnivelo . Ili konsistas tre gravan turisman allogaĵon .

Je la orienta flanko de la montaro, ebenaĵoj etendas por cent sesdek kilometroj ĝis la maro . Sur la ebenaĵoj sia pastas multe miloj da safoj .

Alia tre granda , sed multe diferenca turisma allogaĵo estas la termaj regionoj de la norda insulo .

La plej multo da ili okupas zonon tridek du kilometroj larĝa kaj dudek kvar longan . Ĉi tie troviĝas unu el la plej grandaj spruŝfontoegaj grupoj en la tuta mondo . En la malgranda enklimo oni trovas ĉiujn specojn de varmega fenomeno . Spruŝfontegoj bolantaj lagetojn , kotajn vulkanojn , multe koloritajn terojn , du aktivajn vulkanojn kiuj havas sep kaj naŭ mil da alteco . Ankaŭ la mondfamaj blovtruoj troviĝas , de kiuj venegas altremata vaporo . Ĉi tiun vaporon oni uzas por generi elektro . Estas multe pli granda instalaĵo ol tiu kiuj troviĝas en Itarujo .

Kvankam Novzelando havas multe da industrio proporcie al la loĝantaro, tamen ĝi estas precine agrikultura kaj kampara lando kaj la ĝefaj produkt-
aĵoj estas viando, ŝafano, butero kaj fromaĵo.

Novzelandanoj uzas nur malgrandan porcion de ĝi kaj la plej multe de la produktajo estas eksnortata al el Eŭropo kaj aliaj landoj. Ankaŭ eksnortatej al Japanujo estas stipoj kaj lignaĵo.

Japanaj fiskaptistoj faras longajn vojaĝojn al Novzelando por kapti tonfiŝojn (tuna). Antaŭ ne longe, japana fiskaptisto malsaniĝis pro spendicito. La ŝipestro alportis lin al Gisborne, mia hejmurbo, kaj en la loka hospitalo, oni operaci-
is por la spendicito. Antaŭ ne longe, li resaniĝis kaj post kvar semajnoj la ŝipestro kolektis lin.

Certe Novzelando estas malgranda lando, vere ĝi havas ion da ĝio. Ĉi tie naturo favoras la vivon kaj laboron de homaro per donacoj de modera temperaturo, sana klimato, fruktodora grundo, kaj ĝarma kamparo. Oni miras pri ĝia beleco kaj samtempe ĝia malsimileco.

(Farita de s-ro Frank Wise)

korekto por la 8-a paĝo (de 13-a linio)

La antikvaj Polinesiuloj vojaĝis kurageme en sen ferdekaj kanotoj, du kaj tri mil kilometroj trans nekartila oceano. Por navigado ili uzis inventeman ilon faritan de bastonoj kaj ŝnuroj. Ili direktis la bastonon al iuj steloj kaj tiamaniere, dum nokte, korektis ilian vojiron. Dum la tago ili sindirektis per la suno.

KUN S-RO LATOUR ET GUATEMARA

Takuji Takahasi

Je la 30-a tago de Marto , mi ricevis informon per telefono de d-ro Jamaga ke fremda samideano el Guatemala , nomata s-ro Latour baldaŭ aperos en nia urbo. Por mi estas ĝojiga afero convenigi fremdan junulon, ĉar tiam mi estis en mia printempa libertempo.

Mi rapidis iri al Otaru stacidomo por bonvenigi lin ---- Atendita horo venas kaj vagonaro alvenis al la kajo--- elfluigas amasaj homoj--- sed mi ne povis trovi aspekte fremdan personon ---Mi ~~xxxxxxx~~ penis kapti lin en miaj grandaj okuloj. Mi serĉis tie kaj ĉi tie , en la stacidomo kaj ekster la domo, sed vane . Mi duone perdis esperon vidi lin. ---Tiam mi fine trovis unu sinjoron kiu vagadas ĉirkaŭ la domo. Li portas jakon(ĵamba) kaj botojn kiel ordinaraĵ nordaj loĝantoj surmetas. Kaj lia ^{en vintro} staturo estas egale alta kiel ordinara japano. Sed rigardu , liaj okuloj estas bluaĵ!

"Ĉu vi estas s-ro Latour?" Mi tuĝ demandis al li.

"Mi estas Takahasi de Otaru Esp.Asozio....." Salutoj.

Li plendis ke la trajno estis neregula kaj prokrast-igis kvankam mi atendis longan tempon sed ni tuĝ

fariĝis tre intimaj amikoj kiel ĉiuj esp-istoj faras
tiel . Kaj mi miris kaj ĝojis lian gajan babilemon.

Li iris al la restoracio por ~~xxxxx~~ tagmanĝi.

Biero treege placiis al li kaj ties alkohoraĝo
faris lia pli babilema kaj gaja. Mi havas granda
interesa sciigi pri Guatemara.

"Guatemara troviĝas en mez-Ameriko ..." Mi desegn
-is mapon de Ameriko ĉi mia cerbo sed bedaŭrinde
tiu lando ne aperas. " En suda loko de Meksiko
..." subite mi rememorigis skribaĵon sur ĵurnalo
ke tie okazigis revolucio. "Ĉu revolucio okazigis
en via lando?" " Jes, lastatempe, sed revolucio kaj
tiuĵ bruaĵ aferoj ofte okazigis en mia lando ĉar
tie estas komunistoj kaj nekomunistoj kiel en Kuba
... sed tiaĵ tute ne koncernas al mi..."

Li estas fakte diligente studento de scienco. Mi trovis
grandan diferencon inter li kaj ZEIGAKUREI-studentoj .

Alie mi sciigis pri Guatemara kies ĉefa urbo "Gua-
temara City" troviĝas sur alta loko , en la mezo de la
lando. En la malalta loko , ^(2000 m) en marbordo , estas
tro varma, sed en la alta loko estas milda klimato.

Temperaturo agrable estas de 15 centigrado ĝis 25, kaj
aero estas tre seka. Oni laboras agrikulturan laboron,
ne troviĝas granda industrio kiel Japanujo...

"Mi estas ambasadoro de Guatemala.." Li diris ridetante
, "Ĉar mi estas sola persono el Guatemala." "Do, mi
havas honoron interparoli kun ~~vi~~ ambasadoro s-ro Moŝto".

Mi rekomendis ke li restu en la urbo ĝis morgaŭ kaj
noktigu en mia hejmo, kvankam li deziras preni vesperan
trajnon de la tago. Kaj li fine konsentis al mia plano
pro mia persista petado.

Unue mi gvidis lin al JTB por lia ŝanĝita plano.

Due al Ŝukucu, kie estas granda ligna domo, nomat-
a "Haringo-palaco. Ĉar mi pensis ke li havas grandan
intereson vidi tian konstruaĵon. Li venas al Japanujo
por studi pri "tertreto kaj konstruaĵo" per la invito
de japana registaro. Ni prenis autobuson al Ŝukucu.

El la fenestro de autobuso, ni vidis multamasajn
domaĉojn kiuj malnuriĝitaj nigre pro fumnigro, sed li
ĝojis vidi lasitajn neĝ-amasojn ĉar nenie estas neĝo
en la naskiĝloko. "Morau mi gvidos vin sur neĝon,
kie vivos ludi skion".

Ni forlasis autobuson en Ŝukucu kie ankoraŭ blovas
malvarma vitra vento el norda maro. Troviĝas akvario
kiu ankoraŭ ne malfermis por ni, kaj ni rekte iris
al "haringo-palaco". Mi klarigis al li iom pri la
historio kaj speciala konstru-rimedo de la domo.

Eniris la domon , kaj vidis luksa kolonon kaj vastajn ĉambrojn.

La dommastro invitis min en sia varma ĉambro kaj donis tasetojn da teo apud varma forno. S-ro Latour tre lerte sidigis sur kusenon kiel japana viro per "agura" kaj la mastro demandis al li pri lia vojaĝo.

Mi devis esti interpretisto inter ili, sed kia surpriziga! Li bone respondis al la demandoj tre lerte per japana lingvo. Mi jam sciis ke li restas en nia lando dum nur 6 monatoj. Sed li jam estas duon-japano. La mastro klarigis al ni iom pri haring-kaptado. Mi tradukis iom por nekompreneblaj vortoj.

Revenis la urbon kaj ni iris al japan-stila restoracio , nomata "Kozuŝi", kie jam ĉ-ro Jamaga atendas kaj s-roj Eguĉi kaj Hajakawa baldaŭ venis.

Ni kunsidis ĉirkaŭ tablo, kaj trinkis sakeon kiu treege plaĉis al ~~mi~~ la gasto. S-ro Latour parolis pri sia vojaĝo responde al demandoj de 4 japanoj. Unu parolo , unu pokalo, tiel nia babilado bone funkciis. S-ro Latour jam vojaĝis okcidente al Kuŝu kaj nun nordoriente al Hokkaido.. Pokalon,.. Fine s-ro Eguĉi , la bona kantisto , laŭtvoĉe kantis "Tanko-busi" tre ĥorplene.

Ni manĝis suŝien sed pikajo estis tro freŝa kaj pika. Ĉiuj larmas. Eĉ la gasto el tropika lando plendis ke ĝi estas tro pika. Kelinaĵino venis, tiam li diris al ŝi japane kiel; "KONO WASABI TAHEJ KARAI DESU NE".... ~~XXXX~~ AGARI TAKUSAJ HOSII DESU"% Li scias bone eĉ spaciālajn vortojn kiel MURASAKI(soju) , CUKURI (Saŝimi) . Ni japanoj tre miriĝis je lia multscio ,ĉar eĉ mi ,japano, ne sciis tiujn vortojn ĝis tiam.

Mi gvidis lin al mia hejmo kie miaj familianoj atendas por bonvenigi lin. Kiam li eniris la ĉambron, li rekte iris al mia plejjuna filino Amiko kaj karesis tre afable dirante "O, Ami-ĉan!" . Tial miaj 2 filinetoj tuj amikiĝis kun li . Mi instruis al li iom pri japanaj literoj kaj skribado per karbo kaj peniko.

Sekvantan tagon, mi gvidis lin al Tengu-jama kiu estas la bona ski-ludejo en la sudo de la urbo kaj ofte okazigss ski-konkurso. Feliĉe ankaŭ en la tago okaziĝis ski-konkurso de MnK-pokalo. Iris supren kaj per ski-lifto ni vidis la konkurson de ski-slalomon kaj li havas grandan intereson vidi lertan ski-ludon de la ĉampionoj. Poste ni devis malsupreniri per skio. La deklivo de la monto havas pli ol 30 gradoj.

Estas malmultaj el eĉ logantoj de la urbo kiuj povas malsunreniri de la pinto de la monto. Li vidis neĝon la unuan fojon, li metis skion sur siaj piedoj la unuan fojon kaj vidu, montobazon ĝuste sub liaj piedoj je 400 metroja malsupre! Sed mi kredis ke lia juneco ne timas tion, kaj instruis iom ski-teknikon por malsupreniri.

Poste venis tempo por supreniri. "Oblikve iru dekstren kaj haltu, kaj tie turni via, sekvante maldekstren iru kaj haltu, tiel vi povos iri malsupren." tiel mi instruis. Kaj unue mi iris. S-ro Latour sekvis, sed kia malbona! Li falis sur la unua glitado. Mi helpis lian starigon. Sekvanta. Li denove falas. Trie, ...falas. Kvare ...bone sukcesis!

Tiel ni malsupreniris ĝis la montobazo. Bedaŭrinde li treege laciĝis kaj jam ne havis kuraĝon denove iri al pinto. Sed li treege ĝojis, ~~xxxxxxxxxxxx~~ la unua-fojan ~~xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx~~ la solan sanceon, en lia vivo? ski-ludon, kaj ĉu tio ne estas por li?

Ni devis rapidi al la stacidomo, ĉar ni estis en la monto dum tro longa tempo. Kiam ni atingis al la stacidomo, ni triakis unu pokalon da sakeo

por adiaŭo en la malgranda sakeejo. Kaj kiam la trajno foriris de la kajo, mi memoras ĝojigajn 2 tagojn kaj mi dankas lian bonviziton al mia urbo kaj mia hejmo.

Mi multe lernis de li, priĝoje pri lingva lernado, ke ni devas iri al la lando, se ni deziras lerni iun naturan lingvon. Li bone faras tion. Li tre bone scias japanan lingvon. Kaj mi esperas denove veni niam landon kiel vera ambasadoro de Guatemala.

Lia adreso;

s-ro HECTOR SANCHEZ-LATOUR
7a CALLE O-68 ZONA I
GUATEMALA CITY, C.A.

..... :..... :.....

VOJAĜO DE DORIS M. WORCESTER AL LA BELIA
INSULO DE HOKKAIDO (II)

El Oomoto

20-a Forveturis matene al Oomoto kaj survoje la
ba
autobuso malbone funkciis. Ni devis atendi

dum 1.30horoj . Dum nia atendado ni renkontis kelkajn pasaĝerojn , kaj propagandis nian lingvon , inter ili estis s-ino Fukuda , kiu posedas hotelon ĉe la venonta haltejo ĉe Onneju. Estis necese ŝanĝi buson kaj dum ni atendis , s-ino Fukuda invitis nin al sia hotelo por lunĉo tute senpage . Ŝi estis tre ĝarma . Post la lunĉo ni iris al Bihoro, kie ni noktigis en malgranda hotelo.

21-a De Bihoro , autobuse ni alvenis ĉe Uakoto , kie mi povis viziti Ainan Muzeon . Enhavis ĝiajn specojn de birdoj, papilioj, ovoj ktn. Treege interesa ! Estis tuttaga autobusa veturado tra belegaj kamparo. Multe da neĵaĵoj memorigis min pri Svisujo. ~~Ĝi estas~~ Oni vidas bovojn kaj ŝafojn en la kampoj. Trapasis multajn montojn , kaj vizitis Juoo-zan, kie la vaporo sulfura eliras . Vizitis multajn lokojn survoje . Renkontis kelkajn ainajn grupojn . Alvenis ĉe la lago Akanko, post kiam ni preterpasis multajn belajn arbarojn. Ni noktigis ĉe hotelo Akanko, kaj havis ĝambron, de kie mi povis rigardi la belan lagon . Vespere estis mirinda sunsubiro , kiu spegulās sur la lagon .

22-a Havis bonegan vojaĝon boate en Lago Akan-ko, kaj vizitis insuleton , kie kreskis la "Marimo". La akvoplantoj nuteme kreskas en grandaj vitraj

ujoj por gardi ilia kontraŭ "Souvair"-serĝantoj .
La reston de la mateno mi sidis trankvile apud la
lago dum s-ro Hajakaua promenadis . Post tagmanĝo
ni veturis autobuse al Aŝoro (3 horoj) kaj poste
vagonare al Obihiro. Vagonaro estis malfruiĝinta
duonhoron kaj finfine ni alvenis al Obihiro ĉirkaŭ
18.30. Noktiĝis ĉe malgranda hotelo.

23-a 9.00 trajne al Biŝoo---autobuse de Biŝoo al
Erino . Veturis laŭ la marbordo dum 2 horoj atend-
ante autobuson al Ŝamani . Trajne al Tomikaŭa---
autobuse al Piratori , aĉis vilaĝo , kaj noktiĝis
ĉe la hejmo de amna amikino de s-ro Hajakaŭa.

24-a Restis en la hejmo de s-ino Hana Josida , kaj
parolis kun la nepino ĝis 14.00. Veturis autobuse
al Tomakomae . Vespermanĝis ĉe hotelo Fuĵi-kan,
kie s-ro Hoŝida renkontis nin , kaj gvidis nin
al la Esp-klubo. 18 ĝeestis . Feliĉa vespero.
Noktiĝis ĉe Hotelo Fuĵi-kan.

25-a Adiaŭis s-ron Hajakaŭa je 8.00. Atendis
la alvenon de f-inoj Hitomi Kitabatake kaj Jasuko
Moniŭa. Ni kune iris al la paperfabriko, kie
laboras s-ro JunHoŝida , kiu gvidis nin tra tiu
tre interesa fabrikejo. Poste ni tri virinoj iris
al Nobribecu, la varmbanloko, kie ni pasigis felicajn
tempon. Vespere ni iris al Muroran kaj renkontis

s-ron Hirata kaj Sudoo kaj aliajn en malgranda hotelo. 15 ĝeestis . La du fraŭlinoj hejmeniris al Tomakomai. Estis interese noti ke ĝe Noboribezu unu sinjoro auskultis nian konversacion , kaj alproksimigis kaj informis nin ke en Otaru antaŭ kelkaj jaroj li lernis nian lingvon sed iom forgesis ĝin . Li nun laboras en Sapporo, kaj promesis aliĝi al la klubo tie. Ni multe parolis al li kaj li bone respondis. Lia laboro estis ĝe "Mink"farmo.

26-a Promenis en la urbo Muroran kaj vizitis Lagon Tooja kaj la Oomoto-centron , kie ni renkontis s-ron Kasahara kaj du aliajn. Posttagmeze ni vizitis la vulkanon, vidis la monton kiu levigis rapide dum 6 monatoj antaŭ 18 jaroj . ~~R~~ Revenis al Oomoto kaj vespermanĝis . S-roj Hirata kaj alia gvidis min al Usu al la hejmo de s-ro Hamada (malgranda hotelo) kie mi noktigis . Tre gentilaj homoj, kaj tre gastamaj. Kelkaj venis por paroli al mi pere de s-ro Hirata.

27-a S-ro Hamada akompanis min al Abuta kaj Hakodate kie ni renkontigis kun s-roj Josida kaj Inoue. Ni iris per kablo-vagono al la supro de la monto kaj poste promenis ~~xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx~~ malsupren.

Post la lunĉo ni promenis en la bela parko kaj atendis la alvenon de s-ro Joŝida, kaj denove promenis en la ĉirkaŭaĵo antaŭ ol iri al la stacio por adiaŭi s-ron Hamada. Revenis al la hotelo, tre proksima al la oficejo de s-ro Joŝida, apud la maro, kie s-ro Joŝida, Inoue kaj mi promenis sub la bela stelbrila ĉielo.

28-a S-ro Joŝida gvidis min al la oficejo, kie mi renkontis s-ron Sakae Odaĵima (39-jara veterano de Esperanto). Promenis en la urbo, kaj poste s-ro Inoue kaj mi faris ekskurson autobuse en la ĉirkaŭaĵo. Ventegis! Renkontis s-ron Joŝida kaj poste iris al la kajo kaj ensubiĝis sur la "Macusima-maru" je 18.00. Adiaŭis miajn amikojn kaj vojaĝis al Aomori. Tre maltrankvila vojaĝo ---multaj vojaĝantoj marmalsaniĝis. Por mi estas ĝoja vojaĝo. Alvenis 22.30. Atendis unu horon kaj trafis trajnon al Sendai.

(Fino)

H.E.L 会計報告

(38.6 ~ 38.8)

前回報告分繰越額		1,8740
封筒	220	
私製はがき	140	
INFORMILD 下	1160	
宮林徳子氏刊	100	
山本昭一郎氏刊	400	
HEL大会残	270	
残額		<u>1,7990</u>

世界レスポラント大会後援資金

山 貴 勇	40000
江口音吉	5000
早川 昇	5000
木村喜王治	5000
高橋 連治	1800
横山 良勝	1000
宮 林 徳子	400
佐藤 実	400
佐藤 不=雄	300

累計

58900